

Vizito de gesamideanoj el kelkaj landoj de Eŭropa Unio

de iuj eŭropaj landoj prezentadas proprajn kandidatarojn en la balotkampanjo, kio ebligas kaj rajtigas al ili propagandi per la publika televido de iliaj landoj kaj per afiŝoj favore al siaj kandidataroj kaj pere de tio, fakte, favore al la Internacia Lingvo.

La lasta ĝis nun eldonita numero de la revuo estas la 83a, kiu aperis en septembro de la jaro 2008. Tial ke tiu jaro estis la dua Centjaro de la invado de Hispanio far de la armeo de Napoleono, la ĉeftemo de tiu revuo estis priskribo de tiamaj historiaj eventoj, kaj al ili estis dediĉitaj multaj paĝoj de la revuo.

La 27a de marto de la jaro 2009 okazis Ĝenerala Asembleo de la asocia membraro. Inter la pritraktita temaro estis la organizado de propagando rilate al la ĉi-jara festado de la Centjaro de **Astura Esperanta Asocio**. Estis ĝenerala interakordo pri tio ke nia esperantista rondo ne estas sufiĉe forta por granda festado. Tia estas la afero: unu jarcento post la fondiĝo de la unua esperantista grupo de Esperanto en Gijón kaj en Asturio, ĉiuj geesperantistoj de ĉi tiu urbo kaj eĉ de la tuta regiono povus esti portataj de unu sola aŭtobuso, kaj ankoraŭ restus sufiĉe da liberaj sidlokoj en ĝi.

Kion instruas al ni tiu sperto por la dua jarcento de nia asocio, kiu komenciĝas nun? Unue, ni devas ne malatenti la porEsperantan propagandon en nia urbo. Ĝis nun ne mankis ĉe ni tiutipa propaganda agado, ĉu pere de intervjuoj de la informedioj aŭ de notoj niaj senditaj al la presaro, kaj estis ankaŭ la aktivado ĉe la Festoj de la Lingvoj. Tio ne sufiĉis por veki en nia urbo intereson pri Esperanto. Oni devas pristudi aliajn manierojn alveni al la publiko. Ĉu ni devos probi agadon similan al de tiuj fremdaj gesanideanoj kiuj prezentadas esperantistan kandidataron por la Parlamento de Eŭropa Unio?







Kaj due, pere de la ret-paĝo propagandi favore al la internacia lingvo ankaŭ for de niaj lokaj limoj. Nia mesaĝo en Interreto povas alveni al ĉiu ajn loko en la mondo, jes, sed tio ne signifas ke vidos ĝin ĉiuj personoj konektitaj al Interreto. En Interreto oni trovas nur tion kion oni serĉas. Personoj kiuj ne interesiĝas aŭ tute ne scias pri **Esperanto** ne povas trovi ion pri Esperanto en la reto. Ĉi tiun seneliran rondon oni povas rompi per la metado en Interreton de amasa informo kaj materialo per- kaj pri-Esperanta tiamaniere ke la interetaj serĉiloj kiel la programo **Guglo** (Google), respondante al petoj pri kiel eble plej da materioj kaj temoj, provizu ankaŭ esperantlingvajn paĝojn kiuj estu kapablaj veki la atenton kaj la intereson de la serĉantoj.

Laŭmezure de nia forto kaj kapablo ni devas agadi en tiuj du frontoj: la loka pere de lokaj rimedoj kaj la universala pere de Interreto.

Pasintan 4an de junio de la nuna jaro **Astura Esperanta Asocio** fariĝis centjara. Tiutage ni sendis per retpoŝto esperantistan mesaĝon al tre granda nombro da geesperantistoj kaj esperantistaj organizaĵoj en la kvin kontinentoj, kies retadreson ni povis atingi. En la sekva paĝo ni prezentas la tekston kaj la bildon de tiu mesaĝo, kiu portis ankaŭ la kantadon de **La Espero**.